# *Kubaj sciencistoj rifuzas ofendajn deklarojn de Biden*




Havano, a?g 11 (RHK) Anta? nelonge deklaroj de usona prezidento Joe Biden, en kiuj li nomis Kubon "malsukcesa ?tato" kaj misfamigis la kapablon de la nacia sano kaj scienca sistemo alfronti la defiojn de Kovim-19, lar?a reprezentantaro de kubaj sciencistoj malakceptis tiajn argumentojn per malferma letero, kiu estos sendita al la Blanka Domo.

La? la letero, en la lastaj tagoj, Biden asertis, ke li volonte donos signifajn kvantojn da vakcinoj al la insulo, se internacia organizo respondecus administri ilin, tiel sugestante la bezonon de internacia interveno por garantii imunigon.

Krome, li ofende nomis Kubon "malsukcesa ?tato", kiu malefike administras la pandemion, dum malkvalifikas la kapablojn de la publika sano kaj la laboron de sciencistoj.

Responde al ?i tiuj proponoj - klarigis Mayda Mauri Pérez, unua vicprezidanto de la komerca grupo BioCubaFarma - la letero havas "la celon konigi la argumentojn, kiuj montras la kapablon kaj politikan volon de nia lando por alfronti la defiojn de la pandemio, precipe de la kondi?oj truditaj al ni de la blokado de Usono.

?i emfazis, ke la teksto estos disponebla en elektronika formato por ke sciencistoj, profesiuloj kaj teknikistoj, ?u el la kuba scienca sektoro, ?u el aliaj institucioj en la lando, havu la ?ancon subskribi la leteron.

Doktoro pri sciencoj Agustín Lage Dávila, konsilanto de la prezidanto de BioCubaFarma, memorigis la atingojn de scienco en la kampo de vakcinado dum la lastaj 60 jaroj, precipe tiujn atingitajn en nur jaro kaj duono de alfronti?o kun la Kovim-19, inter kiuj la kvin vakcinaj kandidatoj akiritaj elstaras (unu ja aprobita vakcino) kaj la fakto, ke hodia? la lando gvidas la indekson de intenseco de vakcino en la mondo.

"La maniero estas kunlaboro, ne la bombado de mensogoj, kiujn ni frontas en la lastaj tagoj," diris Agustín Lage, esprimante, ke Kubo subtenas malferman pozicion por kunlabori kun Usono en sciencaj aferoj.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/266703-kubaj-sciencistoj-rifuzas-ofendajn-deklarojn-de-biden

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**